NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com

TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2007 **Nro. 68 (1/07)**



La partoprenantoj en la Zamenhofa festotago kun tri tre junaj novbakitaj esperantistoj, kiuj certigas la estontecon de la Internacia Lingvo en nia urbo.

LOKE ...

NIA SOCIARO.

Dum la jaro 2006,

Aliĝis: AURTENETXE PILDAIN, Eleder
ELORTEGUI BENGOECHEA, Idoia

Eksis: GARRIDO SERRANO, Mercedes (Foriris al alia lando)

Tiel, je la 31-a de decembro 2006, nia Grupo nombris 71 anojn.

NIAJ PLEJ MALNOVAJ SOCIOJ.

La 18-an de aprilo 1953, la E-grupo de Bilbao ekmarŝis denove laŭleĝe post la malpermeso, kiu postsekvis la enlandan militon. El tiu ree starigita rondo restas nur kvin homoj. Jen ili laŭ numero donita en la registrolibro, kiu aperas dekstre de iliaj nomoj:

LARROUY LÓPEZ, Eduardo	6
MIELGO OSTOLOZAGA, Dámaso	10
LÁZARO POZO, Manuela	55
BARÓN LÓPEZ, Amparo	56
SÁNCHEZ PÉREZ, Teódulo	73

ZAMENHOFA FESTOTAGO.

La 16an de decembro, kiel anoncite, ni celebris la jam tradician kunvenon okaze de la naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof. Ĉi-jare kuniĝis ĉirkaŭ dudeko da homoj, kiuj atenteme aŭskultis mallongan paroladon de nia Prezidanto, José Luis Bringas; al tio, kiel ankaŭ jam tradicie, sekvis komuna manĝo de la diversaj varoj alportitaj de la ĉeestantoj.

Salutoj, bondeziroj kaj inteparoladoj okazigis agrablan etoson ĝis malfrua horo, kiam ni ĉiuj revenis hejmen iom pli plenaj de optimismo kaj entuziasmo. (Vidu paĝojn 4-5).

HISTORIO DE LA GRUPO.

Nia senlacema amiko Iñaki Vélez daŭrigas sian kompiladon de divesaj dokumentoj kaj fotoj pri la historio de la Grupo. Tiel, li ellaboris novan version de tiu historio per prilaboro de nova KD,en kiu estis aldonitaj diversaj novaĵoj al tiuj de la antaŭa KD. Ĉu iam tiu laboro estos disponebla por la ĝenerala publiko?.

HISPANA E-FEDERACIO (HEF).

Dum la estrarkunveno 2006-10-02 jenaj reprezentantoj estis konfirmitaj:

- Rilatoj kun esperantaj grupoj: Manolo Parra.
- Rilatoj kun Eŭropa Esperanto-Unio: Pedro Hernández.
- Rilatoj kun ILEI: Augusto Casquero (provizore).
- Rilatoj kun TEJO: David Trigo, Prezidanto de HEJS.
- Informado al gazetaro: M. Pancorbo (eventuale, Toño kaj P. Hdez).
- UEA A-Komitatano: J. Miguel García Iturrioz.
- UEA-Kotizperantoj (ne dependas de HEF): P.Garrote kaj Kataluna E-Asocio.
- UEA-ĉefdelegito (ne dependas de HEF): Fernando Moral.

Kunveno de la estraro (2006-11-27):

- La Hispana Kongreso okazos en Palos de la Frontera (Huelva) ekde la 5-a ĝis la 8-a de julio 2007.
- Por 2007 oni aprobis la samajn kotizojn por HEF-membroj kiel en 2006.
- Miguel Angel Sancho prezentis la novan paĝaron de HEF (www.esperanto.es).
- HEF helpos al la Junulara Sekcio (HEJS) dum la organizado de la "Iberia Renkontiĝo", eble okazonta en Madrido la duan semajnfinon de marto.

("Nia Voĉo", organo de Madrida E-Liceo. Diciembre 2006).

NOVA TTT-PAĜARO DE HEF.

Antau nelonge, la retpaĝaro de HEF estis renovigita. Nun ĝi encavas du partojn: unu por informado al ekstera publiko en la hispana kaj, alia, en Esperanto. Miguel A. Sancho kaj José Rodríguez estas la kreantoj de tiu nova aspecto. La nova adreso estas www.esperanto.es

("Boletín". N-ro 376. Oktobro/decembro 2006)

INTERRETA VERSIO DE LA VORTARO DE F. de DIEGO.

Post kelkaj monatoj estos finpreta la unua interreta versio de la "Granda Vortaro" de Fernando de Diego. Ĝi estos konsultilo plej actúala de la jam fama vortaro. La reviziantoj, Héctor Alòs, Jorge Camacho, Miguel Fernández kaj Miguel Gutiérrez, kunordigitaj de Antonio Valén, plu laboras en la finpretiĝo.

("Boletín". N-ro 376. Oktobro/decembro 2006)

LA NOMO "ESPERANTO" EN HISPANIO.

Mi trovis du nuntempajn hispanajn homojn kies nomo estas "Esperanto"!:

1.. JUAN ESPERANTO FERREIRO SABORIT. BILBAO-VIZCAYA
2.. ESPERANTO LOPEZ CATALAN. ALCAZAR DE SAN JUAN CIUDAD REAL

Toño del Barrio (01-02-2007)

ZAMENHOFA FESTOTAGO (16/12/2007)



Nia Prezidanto, José Luis Bringas antaŭ alparoli la ĉeestantojn

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 92-a Universala Kongreso. Ĝi okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007 en Jokohamo (Japanio).
- 93-a Universala Kongreso. En la jaro 2008, en Roterdamo (Nederlando), la urbo kie troviĝas la sidejo de Universala E-Asocio.
- 7-a kongreso de Eŭropa E-Unio, la 1-a post Bilbao. En Maribor (Slovenio), de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.

ZAMENHOFA FESTOTAGO (16/12/2007)



Vigla etoso kaj granda emo interparoli

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 66-a kongreso de Hispana E-Federacio. 5/8 de julio 2007, en Palos de la Frontera (Huelva); kune kun la kongreso de Andaluzia E-Unuiĝo. Pro proksimeco al Portugalio, oni atendas la alvenon de portugalaj samideanoj.

- 80-a Congreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Parizo. Inĝeniera Lernejo "École Centrale", en Chatenay-Malabry, suda ĉirkaŭurbo de Parizo. 21/28 julio 2007.

TRA LA MONDO ...

E-POŜTMARKO EN ISRAELO.

Granda atingo por la E-movado en Israelí: ĉi-semajne aperis la unua E-poŝtmarko en Israelo (honore al Zamenhof). Fakte ĝi ne precize estis la unua - okaze de la 52a UK en Tel Avivo (kiu ne okazis pro la milito de 1967) - la Israela filatela servo planis eldoni specialan poŝtmarkon. Pro la nuligo de la UK oni nuligis la eldonon kaj detruis pli ol miliono da poŝtmarkoj kiuj estis jam presitaj.

(Amri Wandel. 26/12/2006)

LA PAPO ALPAROLAS ESPERANTE.

Post la kristnaska mesaĝo, la Papo eldiris siajn bondezirojn en 64 lingvoj. Post tiu en 2004, ripetiĝis papa bondeziro en Esperanto okaze de Kristnasko: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!".

HEF . 25/12/2006

EU KAJ LA LINGVA PROBLEMO.

Ekde la 1-a de januaro, la bulgara, rumana kaj gaela nombrigos la oficialajn lingvojn de EU je 23. Al tiuj oni devas aldoni la uzon de la 4 hispanaj lingvoj oficialaj en iliaj respektivaj regionoj, t.e., vaska, kataluna, galega kaj valencia.

Oficejoj pri interpretado kaj tradukado dungis, en januaro 2006, 132 profesiuloj, kiuj prilaboros la bulgaran, 135 la rumanan kaj 5 la gaelan.

Ĉefespondeculo pri Educado, Klerigado, Kulturo kaj Plurlingvismo, Jan Figel, bonvenigis la 3 novajn lingvojn, kiuj plifortigos la "lingvan diversecon" en EŬ."La apogo al tiu diverseco celo por la Eŭropa Komisiono. Bruselo informis, pere de raporto, ke la tradukkostoj por la tuta EŬ, dum 2006, estis 800 milionoj de eŭroj.

Nuntempe, kiel tradukistoj, nur por la eŭropa estraro, laboras tri profesiuloj por ĉiu lingvo, al kiuj aldoniĝas ses pliaj en la Eŭropa Parlamento Europeo. La tradukservo de EU enhavas 39 bulgaroj y 42 rumanoj. Pri la gaela, momente validos kunsento kun la irlanda estraro, tiel ke ĝis post 5 jaroj oni tradukos al tiu lingvo nur laleĝojn aprobitaj de la eŭropaj estraro kaj Parlamento, krom la skribaĵoj de la civitanoj al eŭropaj institucioj. Por tio, oni dungis jam 5 tradukistojn.

Alie, la 1-an de januaro finiĝis la 3-jara periodo, dum kiu ne Cluj dokumentoj estis tradukitaj al la malta; post tiu dato, la malta lingvo estos samrajta ol la aliaj.

Pri la hispanaj lingvoj oficialaj en iliaj regionoj: krom la 23 oficialaj lingvoj en EU, ekde la 1-a de januaro de 2007, en tiuj 4 lingvoj: galega, vaska, kataluna kaj valencia.

(Ismael Ejarque. 30/12/2006)

LA "LUNNOJ" EN ESPERANTO.

La produktistoj de Lunnoj sendis kopion de la ĉapitro kun esperanta intervjuo. Jen rekta adreso por vidi la videon:

http://www.youtube.com/watch?v=60xtdEsGBQI

Estas ege bone ke infanoj sciu, per "siaj" programoj, pri nia lingvo.

(Darío Rodríguez. 12/01/2007)

UEA KAJ LA PACNOBELPREMIO.

Sendita letero de la estraro de Norvega Esperantista Ligo (NEL) al UEA kun klara recomendo:

"Norvega E-Ligo ricevis la cirkulerajn instigojn de UEA kontribui al kampanjo celanta al la kandidatigo de UEA por la Nobel-premio pri Paco de 2008.

Ni kiuj loĝas en la lando kie la Nobel pacpremio estas ĉiujare asignita kaj transdonita eble pli facile ol alilandanoj konatiĝis kun la kondiĉoj por la elektoj. De jaroj ni miras pri la kampanjoj de UEA pri tiu premio.

Ni bedaŭras devi esprimi nian sinceran opinion ke la agado de UEA por la paco neniel sufiĉas por meriti konsideron por la Nobel-pacpremio. Eĉ la prave prifierataj korespondaj servoj dum la (antaŭlongaj) mondmilitoj ne toleras komparon kun la paralela servo de la Ruĝa Kruco. Kaj en la hodiaŭa internacia areno Esperanto kaj UEA apenaŭ videblas.

Ni memorigas ankaŭ pri la atentigo de Gunnar Gällmo (en retpoŝto 3 jan 2007), kiu (traduke) citis deklaron de la norvega pacpremia komitato: "ke kampanjoj .... organizataj favore al unuopaj kandidatoj ..... malmulte influas la elekton de la komitato, kaj povas facile efiki kontraŭ sia intenco". Ankaŭ mankas "propaganda" valoro de kandidatigo, ĉar (samdeklare) "la komitato ne publikigas nomojn de la kandidatoj proponitaj".

Sekve ni konsilas al UEA nuligi la kampanjon. Ni opinias ke pli valorus konkreta laboro por pli vasta uzado de Esperanto, ekzemple en nova porpaca aktiveco.

Nome de la estraro de Norvega E-Ligo, kunlaboreme salutas Douglas Drapersek.

(Sendis, per retpoŝto, Torstein Kvakland. komitatano A. NEL)

NIAJ AKTIVULOJ ...

LUIS de OTAOLA y FAÓN (1903-1995)



Luis de Otaola y Faón estis esperantisto pri kiu, ĉiu kiu konis lin certe memoras. Lia, pro malsano, tordita kolo; kapo ofte ornamita per vaska bereto; profunda kaj forta voĉo; lia perfekta prononcado de Esperanto kun riĉa vortprovizo ... kaj liaj polemikaj opinioj pri kia ajn temo, ankoraŭ restas en niaj mensoj.

Hazarde, li naskigxis en Kantabrio, sed baldaŭ translokiĝis al Bilbao, kie li esperantistiĝis en la jaro 1918 (nur 15-jara!), sub la gvidado de Félix Díez Mateo, dum kurso en la lernejo "Berastegui".

Li ne estis la sola esperantisto ene de sia familio, ĉar du fratinoj ankaŭ lernis la Internacian Lingvon, tre bone regata, precipe, de Felisa Otaola, kiu mortis en la jaro 1936, en la strato Iturribide, dum laboris en ŝufabriko, pro bombo lanĉita de aviadilo de la armeo de Franco. Ĝuste en tiu sama strato Iturribide, en la numero 6, 1-a etaĝo, troviĝis tiam la E-Grupo, en ege malgranda ĉambreto, luita de la posedanto de la kafejo "Gayarre", kiu lokiĝis ĝuste sub la E-Grupo.

Antaŭ ol la hispana milito, Otaola ne havis preskaŭ aktivecon rilate la E-movadon, sed post la reapero de la Grupo, en 1953, li eniras la asocian vivon entuziasme. Tamen, ĉiam iom speciala homo, rifuzas, je la komenco, aparteni al la unua estraro (en la sociara registrolibro li havas la numeron 19, sufiĉe poste de la estraranoj kaj plej aktivaj homoj) kaj ankaŭ ne apartenas al la LKK de la hispana kongreso, okazinta en Bilbao en 1953.

Tio ne signifas ke li apartiĝas el la E-vivo; tute kontraŭe, oni memoras pri li kiel homo preta por kio ajn: dum pluraj jaroj li gvidas E-kursojn, estas Prezidanto de la Grupo en la periodoj 1955/59 kaj 1963/69, plurfoje Secretario, kasisto kaj voĉdonanto; ankaŭ apartenis, kiel voĉdonanto, al la estraro de Hispana E-Federacio en 1955, 1969, ... ; kaj li estis nemalhavebla ĉeestanto de ĉiuj naciaj kaj internaciaj kongresoj; certe estas la esperantisto de Bilbao, kiu plejfoje partoprenis UK kaj hispanajn kongresojn, tiel ke lia svelta figuro fariĝis símbolo de la ĉeesto de la E-Grupo de Bilbao mem.

Sed estas unu afero, pri kiu ni ĉiuj devas porĉiam danki al Sro. Otaola: danke al li, la E-Grupo de Bilbao sukcesis havi la nunan sidejon; tiel ke Otaola estis homo vaste konata en la malnova kvartalo de Bilbao kaj ankaŭ tre konata kiel esperantisto, dum tiuj grizaj jaroj postmilitaj, Pedro Molina Mínguez kaj Pedro Infante López de Alda, ambaŭ esperantistoj kaj ambaŭ membroj de la tiel nomata "Libera Asocio de Oficistoj", antaŭa posedanto de la ejo, alparolis Otaolan pri la fakto, ke la lokalo restis neokupata kaj la eblo alproprigi ĝin kel sidejo de renaskiĝanta E-Asocio en Bilbao. Tiel oni faris danke al Otaola.

92-jara, li mortis en Brihuega (Guadalajara), ĉar tie loĝis en maljunulejo, la 9-an de aprilo 1995.

(El "Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo" de A. Marco Botella. Zaragoza 1987, el laboro de Iñaki Vélez kaj el eksterordinara memorkapablo de nia amiko Eduardo Larrouy).